

Usona Esperantisto № 2021:1 (jan-feb)

Anoncoj

Nova informilo de *Esperanto por UN*; La Usona Bona Filmfestivalo; Forpasis Alberta CASEY; Forpasis Jane D. STRANSKE; Forpasis Maria MURPHY; Kandidatoj por 2021; Antologia skizo de la persa literaturo, libere havebla; Alvoko al Esperantologia Konferenco; Alvoko al instruistoj de Esperanto; Help us promote your blog; Korespondpeto el Miĉigano

Konservi nian historion

anoncoj • Humphrey TONKIN

Se vi scias pri kolektoj nekonataj aŭ endanĝerigataj, bonvolu nepre kontakti ESF!

Kia semajno!

de la prezidanto • Filipo DORCAS

Through all the disruptions and crises that we face, we are reminded of our strong friendships in Esperanto.

De la estraro

Dumonataj raportoj de la Direktoroj kaj aliaj estraranoj.

Memoroj de uragano Audrey

loke • Fred MEYER, III

Memoroj de mi kaj mia estonta edzino Susan pri Uragano Audrey en Junio, 1957 kiam ni estis naŭ-jaraj.

Mikronoveloj

Novaj centvortaĵoj.

A sucking chest wound of a challenge

traduku! • Hoss FIROOZANIA

Respondoj al la defio el *Little Brother*; nova defio el *Three Vagabonds of Trinidad* de Bret HARTE.

Spegulaj tonoj

beletre • Sheila DEVLIN

Eksperimento adapti la poemon *Memore* de Johán VALANO al muzika formo.

Krucvortenigmo

enigmoj • Timothy BORONCZYK

Revenas nia defio por vortludemuloj.

Strange, sed vere

Strangaj novaĵoj el ĉirkaŭ la mondo, en facila Esperanto.

La vivo de Peĉjo

ŝercoj • Timothy BORONCZYK

La dektria en serio de Timothy BORONCZYK.

Esperanto, Passport to the Whole World

el la arĥivo

A 1996 announcement for an ambitious new video course teaching the basics of Esperanto.



Announcements

Nova informilo de *Esperanto* por UN


Aperis informilo n-ro 50 (jan-feb 2021) de *Esperanto por UN*; ĝi **haveblas rete** <<https://bit.ly/30z6ITz>> en Esperanto kaj la angla lingvo. Resumo de la enhavo:



- UEA markis cent jarojn da kunlaboro kun internaciaj organizoj en Decembro 2020
- La informilo atingis sian kvindekan numeron
- Rezolucio alvokas al pli da multflankismo kaj atento al lingva politiko en UN
- La Konferenco de Ne-registaraj Organizoj emfazis la bezonon de pli bonaj rilatoj kun NROj dum la pandemio
- UN-Tago 2020: “La mondo estas pli bona pro la ekzisto de UN, sed nesufiĉe pli bona.”

La Usona Bona Filmfestivalo

Esperanto-USA okazigas mallongan filmfestivalon kun kontantaj premioj por la unuaj dek gajnintoj. La limdato estas la 1-a de Majo, 2021. Partopreno estas senkosta kaj vi ne devas aliĝi al Esperanto-USA por partopreni! Ĉiuj ĝenroj estas bonvenaj, sed via filmo devas esti tute en Esperanto, kun almenaŭ dek Esperanto-vortoj parolataj. Cetere, en la filmo devas aperi taso de kafo.



La unua premiito ricevos \$300; la dua, \$200; la tria, \$150, kaj po \$50 por la kvara ĝis deka.

Por pli da informo, inkluzive la plenan regularon, vidu nian paĝon por la filmfestivalo.

Forpasis Alberta CASEY

Alberta CASEY forpasis la 11-an de Decembro, 2020,

en La Jolla. Ŝi havis 102 jarojn.



Alberta Kathryn SEABOLD naskiĝis la 20-an de Novembro, 1918 en Sankta Luiso (Misurio). Ŝi estis la plej juna inter tri fratinoj, el kiuj la unua (Miriam) fariĝis dancistino kaj la dua fariĝis loka politika aktivisto. En 1929 Alberta vizitis Kalifornion kun sia patrino kaj ensorĉiĝis pri La Jolla (*la-HOJ-ja*), malgranda apudmara vilaĝo kie infanoj kiaj ŝi povis rajdi ĉevalojn eĉ en la ĉefaj stratoj.


Jam de sia infanaĝo Alberta deziris fariĝi muzikisto, eklernante violonon, kiun ŝi plustudis ĉe Akademio de la Sankta Koro (Sacred Heart Visitation Academy), katolika gimnazio por knabinoj, poste ĉe la Instituto de Muziko de Sankta Luiso (St. Louis Institute of Music). En 1940 ŝi ludis kun la Virina Simfonio de Sankta Luiso.

En 1941 ŝi edziniĝis al juna advokato David S. CASEY, kaj baldaŭ venis al ili filineto Julia.

La familio translokiĝis al Sandiego en 1947, kie David starigis sian propran advokatan firmaon, kaj en 1949 ili bonvenigis duan infanon, David Jr., kaj ekloĝis en La Jolla. La Jolla tiam ne plu estis la “vilaĝo” kiu tiel logis Albertan en 1929, tamen ĝi restis logega por ŝi kaj ŝi vikle partoprenis en lokaj kulturaj agadoj. Ŝi dividis siajn tagojn inter la du infanoj, la violono, tenisludado kaj skiado; kaj ŝi komencis serioze pentri. Kun grupo de pentristaj amikinoj (the Market Street Group) ŝi eĉ prezentis ekspozicion en Parizo en 1994.

Taksante sin ĉiel artisto, Alberta kiel eble subtenis lokajn teatrajn grupojn (kvankam ŝi verŝajne neniam mem aktoris) kaj fariĝis studentino en 1952 en la tute nova Kolegio por Virinoj de San Diego (San Diego College of Women), kie ŝi fondis klubon por eksstudentoj de sia antaŭa gimnazio. En 1972 la kolegio unuiĝis kun jezuita kolegio por viroj sub la nova nomo Universitato de San Diego (USD). Gravis por Alberta, ke USD inkluzivas unu el la plej elstaraj kolegioj pri juro en la regiono (de kie, cetere,

diplomiĝis ŝia filo David).
Ĝis la fino de sia vivo,
Alberta restis vigla
subtenanto de USD, kie ŝi
kreis stipendion por
diplomatinoj kiuj decidis
daŭrigi siajn studojn en la
jura kolegio.



Desegnaĵo de
Ludoviko ZAMENHOF
fare de Alberta CASEY.

Ekesperantistiĝinte en 1971
kiam ŝi unuafoje aŭdis nian
lingvon dum vizito en
Londono, Alberta baldaŭ
aktivis en usonaj kaj internaciaj Esperantaj rondoj
kaj fariĝis delegito pri katolikismo en La Jolla.
Antaŭvideble, ŝi pentris kaj desegnis Zamenhofon,
kaj en Esperantaj eventoj ŝi ofte kantis tradukojn de
siaj plej ŝatataj kantoj. Ŝi eĉ produktis diskojn:
*Alberta Casey Kantas Esperante: Al Vi de Mi kaj San
Diego Vokas*, ambaŭ poste haveblaj ankaŭ en kaseda
formato.

Alberta certe havis siajn proprajn preferojn, sed
samtempe ŝi restis ĉiam tolerema; tute ne ĝenis ŝin
tio ke aliaj ankaŭ siajn proprajn preferojn havis.
(Ekzemple, ŝia filo fariĝis gravulo en lokaj rondoj de
la Demokrata partio, dum ŝi restis tutvive lojala al la
partio Respublikana.)

Alberta mankos al ni; ŝiaj konstanteco, entuziasmo,
optimismo, kaj afableco amigis ĉiujn.

— D. K. JORDAN

Forpasis Jane D. D'STRANSKE

Jane D. D'Stranske forpasis la 22-an de Decembro en
Losanĝeleso, Kalifornio. Ŝi havis 93 jarojn. Ŝi estis
longtempa membro de Esperanto-USA.

Forpasis Maria MURPHY

Maria Liwscyz MURPHY
forpasis la 19-an de Januaro
pro komplikajoj de
KOVIM-19. Ŝi havis 82
jarojn. Ŝi estis postvivanto
de la Holokaŭsto,
mondvojaĝanta kuracisto,
multlingvulo kiu parolis sep



lingvojn, kaj ŝi sole edukis du filojn post la forpaso de
sia edzo.

Maria naskiĝis en Varsovio la 1-an de Oktobro, 1938,
en tumulta periodo ĉe la komenco de la Dua
Mondmilito. Kiel judo en Pollando, ŝi povintus esti
mortigita, sed ŝia patrino estis lerta kaj havis
rimedojn por kaŝi ŝin ĉe bieno kun kristana familio.
Multajn jarojn poste, Maria rakontis, ke unu el la plej
ŝatataj infanaj taskoj ĉe la bieno estis postĉasado de
la kokinoj. Post la milito, la patrino revenis kaj
transportis Marian al Jerusalemo, kie ili unue loĝis ĉe
kibuco, kaj poste revenis al postmilita Pollando.

Fine la patrino transportis Marian kaj ŝiajn du
fratinojn al Bostono, Usono, por komenci novan
vivon. Maria decidis esti kuracisto, kaj ŝi faris sian
medicinan trejnadon unue en Usono kaj poste en
Italujo, kie ŝi doktoriĝis ĉe la Universitato de Romo.

Ŝia filo David diras: “Kiam ajn ŝi vizitis min, kie ajn
mi loĝis, kaj mi prezentis al ŝi miajn konatojn, ŝi ĉiam
demandis al ili, ĉu mi jam sciigis ilin pri Esperanto.
Post iom da tempo, mi komencis anticipi sciigi
konatojn pri la lingvo por ke ili povu respondi jese
kiam ŝi pridemandis ilin. Cetere, ŝi informis pri la
lingvo al ĉiuj, kiuj ŝi renkontis, senescepte, tiel ke
finfine mi konsilis, ke ŝi ŝanĝu sian saluton de ‘Hello!’
al ‘Esperanto!’ por ŝpari tempon.”

Kvankam ambaŭ ŝiaj filoj lernis Esperanton, ili ne
retenis ĝin, sed ŝia evidenta pasio kaj amo por la
lingvo profunde impresis ilin ambaŭ. Esperanto estis
pela potenco en ŝia vivo, kaj kondukis ŝin al la viro
kun kiu ŝi edziniĝis, Ralph MURPHY.

Post la doktoriĝo, Maria laboris en Bostono ĝis la
frujaj 80-aj jaroj, kiam ŝi transloĝigis sian familion al
Florido. Ili unue ekloĝis en Islamorada, poste Port
Charlotte, kaj fine ili transloĝiĝis al apudmara hejmo
en Englewood. Kiam ŝi loĝis en Port Charlotte ŝi
establis propran kuracejon tie, kaj funkciigis ĝin ĝis
sia emeritiĝo en la fruaj 90-aj jaroj.

Post la emeritiĝo ŝi pasigis tempon vojaĝante tra la
mondo, ĝuis plaĝon, naĝejon, aŭ YMCA-on,
partoprenis en diversaj fremdlingvaj diskutgrupoj,
kaj ĉeestis ceremoniojn ĉe sinagogoj kaj preĝejoj de
Unitariana Universalismo.

Se vi volas aŭdi la rakonton pri Maria de ŝi mem, jen

intervjuo en la angla <<https://youtu.be/iudlwcNrJhE>>, registrita de ŝia filo David, kaj jen **intervjuo en Esperanto** <<https://youtu.be/R18rVf6DDsw>> registrita ĉe NASK en 2013.

[*Dankon al David MURPHY pro la informo.*]

Kandidatoj por 2021

Jen la listo de la kandidatoj por la ĉi-jara balotado, aprobita unuanime de la Kandidatiga Komitato:

Ofico	Nomo
Direktoro	Timothy BORONCZYK
Direktoro	Jane SHEVTSOV
Direktoro	Kinsio FAVRE
Direktoro	Myrtis SMITH
Kasisto	David BECK



— Jorge Rafael NOGUERAS, Estro de la Kandidatiga Komitato de Esperanto-USA por 2021 rafaeln1@gmail.com

Antologia skizo de la persa literaturo

La Eldonserio Oriento-Okcidento, aŭspiciata de UEA, en Konsulta Partnereco kun Unesko, pliriĉiĝis per nova titolo, *Antologia skizo de la persa literaturo*, kiu ĵus aperis ĉe la eldonejo Impeto en Moskvo, paperforme kaj elektronike (senpaga elŝuto).



Ĝi konsistas el prozspecimenoj de 33 aŭtoroj aŭ libroj kaj poemspecimenoj de 24 poetoj. Redaktis Dmitrij ŜEVĈENKO kaj Anna STRIGANOVA, kaj provlegis Rob MOERBEEK. La antaŭparolon verkis A. Giridhar RAO. La ĉefa enhavo estas grandparte traduko de Said BALUĈI el parto de originala antologio en la persa. Tiu numero de la eldonserio estas aparte grava pro tio, ke

je la unua fojo en ĝi aperas antologio de persa literaturo.

La PDF-versio de la libro

<<http://persa.trovu.com>> estas tute libere kaj senpage elŝutebla. La papera versio baldaŭ troveblus en la internaciaj kaj landaj Esperanto-libroservoj, i.a. en la **libroservo de UEA**

<<http://katalogo.uea.org>>.

Alvoko al la 43-a Esperantologia Konferenco

La organizantoj alvokas ĉiujn fakulojn, sciencistojn kaj aliajn kongresanojn al partopreno en la Esperantologia Konferenco 2021, sub la aŭspicioj de Universala Esperanto-Asocio (UEA) kaj la Centro de Esploro kaj Dokumentado pri Mondaj Lingvaj Problemoj (CED).



La ĉi-jara aranĝo pritraktos la temon *Defioj por lingvoj kaj komunikado en mondo virtuale kunligita*. La temo rekte rilatas al la nuna situacio de la mondo – t.e., virtualaj versioj de la Universala Kongreso, Esperanto-renkontiĝoj kiuj pli ofte okazas interrete, juna esperantistaro kiu plifortiĝas pro retaj lingvo-kursoj kaj, pli grave, lingvo-uzado kiu ŝanĝiĝas pro la fakto, ke distanco ne same gravas kiam temas pri ne vid-al-vida komunikado.

La konferenco okazos en tri partoj: la unua konsistos el dudek-minutaj prezentoj pri referaĵoj ĉirkaŭ la konferenca temo. La dua parto temos pri mallongaj, tri-minutaj prezentoj, surbaze de unu bildo, pri esploroj rilataj al la ĉefa temo aŭ pri Esperantologio pli ĝenerale. La tria parto enhavos rondan tablon, malferman al la partopreno de ĉiuj ĉeestantoj, pri lingvo-uzado, aktivado kaj esplorado dum la koronavirusa pandemio.

Ni invitas ĉiujn fakulojn, aparte junulojn kaj unuafojajn partoprenantojn, sendi proponojn pri referaĵoj (por la unua parto de la konferenco) kaj/aŭ mallongajn prezentojn (por la dua parto). La proponoj – enhavantaj inter 150 kaj 200 vortoj – estu

sendataj kep baldaŭ al guilhermefians@gmail.com kaj oraola@gmail.com. La proponantoj indiku ĉu ili emas prezenti nur ĉeeste, nur virtuale aŭ en ambaŭ okazoj.

La limdato por la proponoj estas la 30-a de Aprilo.

Alvoko al instruistoj de Esperanto

Ĉu vi instruas Esperanton? Bonvolu registri vian kurson en la **reta Kursejo de edukado.net**



<<https://edukado.net>

/kursejo>. Ĝi estas la oficiala loko, kie ILEI kaj UEA esperas vidi la situacion de instruado de Esperanto tra la tuta mondo. La informoj helpas en informado pri Esperanto kaj montras, ke la Internacia Lingvo estas instruata en multaj lokoj.

Tiuj informoj gravas al ĉiuj, kiuj pledas por enkonduko de Esperanto en lernejoj. Necesos nur kvin kvin minutoj por registri vian kurson, kaj sekve por ankaŭ ebligi internaciajn rilatojn inter lernejoj.

Advertise your blog (or YouTube channel, etc.) with us!

Are you a member of Esperanto-USA? Do you have a blog where you sometimes write in or about Esperanto? If so, we want to help you increase your

audience and share your work with other Esperantists.

It doesn't have to be a conventional blog; it can be a a podcast, a YouTube channel, or any online resource that provides a syndication feed in RSS or Atom formats. And if you don't want to share everything, there's even a magic hashtag you can use to determine which posts we publicize, and which ones we skip.

We list the blogs we track on our "blog posts" page (at **About us > Blog posts**). If yours isn't listed there, please contact webmaster@esperanto-usa.org so we can add you.

Korespondi deziras

Mi deziras korespondi kun esperantistoj tra la tuta mondo. Ĉar retpoŝto estas pli malmultekosta kaj pli rapida, mi uzas ĝin. Mi estas maljuna, emerita, universitata instruisto el Miĉigano, Usono. Plaĉas al mi ekscii pri via vivo kaj kulturo.



Ed ARNOLD, avoed@mail.com



Konservi nian historion

Por nunaj kaj estontaj generacioj

anoncoj • Humphrey TONKIN

Antaŭ kelkaj monatoj, maljuna novjorka esperantisto, neniam aktiva en la movado sed akumulinta malgrandan kolekton de Esperanto-libroj, kontaktis la oficejon de Universala Esperanto-Asocio en Novjorko. “Mi baldaŭ translokiĝos al asistejo”, li diris, “kaj mi volas liberiĝi je mia libraro. Ĉu vi povas utiligi miajn Esperanto-librojn?”

Ni tuj intervenis. Mi vizitis la malavaran esperantiston kaj trarigardis la kolekton. Raul GARCÍA, prezidanto de la novjorka Esperanto-societo, aranĝis, ke la tuto estu enpakita kaj sendita al la oficejo de *Esperantic Studies Foundation* en Norda Karolino. Tie, oni decidis kiuj libroj taŭgas por la kreskanta kolekto de Esperanto-materialo en la biblioteko de la Universitato Princeton, kaj kiuj libroj iru al la Universitato de Masaĉuseco, kiu ankaŭ kolektas materialon por suplementi sian Kolekton Boschen.

Restis iom da materialo netaŭga por tiuj kolektoj, aŭ konsistanta el duoblaĵoj. ESF serĉos hejmon ankaŭ por ili, kaj tenos iom da materialo por uzo de la studentoj de NASK, la someraj Esperanto-kursoj organizataj de ESF.

Pli granda kolekto lastatempe haveblis en meza Usono. ESF intervenis, kaj aranĝis, ke la familianoj de la koncerna forpasinta esperantisto donacu la tuton al la Universitato de Masaĉuseco, kiu nun katalogas ĝin kaj disponigas ĝin al esplorantoj kaj al la publiko.

Malgranda kolekto de manuskripta materialo, grava ĉar rilata al Esperanto-leksikografio, posedaĵo de forpasinta esperantisto, estis donacita, post interveno



de ESF, al Princeton.

Tute lastatempe, la familio de ĵus forpasinta esperantisto kiu estis aktiva en la lastaj jaroj de la usona Esperanto-organizo EANA, kontaktis la novjorkan oficejon de UEA kun simila demando. Kion fari pri la libroj, manuskriptoj kaj komputilaj dosieroj? ESF ilin pritaksos kaj distribuos al taŭgaj ricevantoj.

Esperantic Studies Foundation havas tri ĉefajn prioritatojn nuntempe: Esplorado, Edukado, Konservado. Ĉi-lasta celas trovi kaj konservi postlasitajn kolektojn, protokolojn de lokaj kluboj, korespondaĵojn, librojn. Feliĉe, Princeton antaŭ kelkaj jaroj faris decidon kreskigi sian kolekton de materialoj pri planlingvoj – interalie sub la influo de entute tri profesoroj ĉe Princeton kiuj faras esplorojn kiuj rilatas al tiu temo. Kiam, antaŭ pluraj jaroj, mortis la konata esperantisto Allan BOSCHEN, li postlasis sian bibliotekon al la Universitato de Masaĉuseco, kiu nun pliampleksigas ĝin por formi kolekton kiu ilustru la socian historion de Usono en la dudeka jarcento pere de la socia movado kiu nomiĝas la Esperanto-movado. La arkivo de la iama ELNA, nun Esperanto-USA, estas lokita en Amherst, ĉe la universitata biblioteko.

ESF ne nur helpas financi tiun ĉi agadon, sed ankaŭ subvencias esploron – bedaŭrinde nunmomente en paŭzo pro la pandemio.

Se vi scias pri kolektoj nekonataj aŭ endanĝerigataj, bonvolu nepre kontakti ESF, pere de ĝia prezidanto Humphrey TONKIN tonkin@hartford.edu aŭ ĝia ĉefdirektoro Chuck MAYS chuck.mays@esperantic.org. Kaj se vi volas finance helpi la laboron de ESF por Konservado, iru al **ties retejo** <<http://esperantic.org>>. Dankon!

Kia semajno!

de la prezidanto • Filipino DORCAS

For each issue of *Usona Esperantisto* I try to write a motivational and newsworthy article that relates closely with our Esperanto projects, goals, and vision. That is a difficult task for me right now. How does it all relate? We are experiencing historical events. Upheavals wrack the world. How much distraction and interruption can we endure? What is next?

Here in Texas, we have emerged from a devastating winter storm. Other regions have experienced it also. People have suffered from lack of electricity, lack of potable water, and frozen water pipes. Homes and businesses have been flooded. The storm began with a terrible 135-car accident caused by the dreaded black ice. Neighborhood stores are either closed or have nearly bare shelves.

And then there is the COVID-19 pandemic. The stories abound.

But I want to write about the other side of the news.

Normally there are reports of wild riots and looting during a crisis such as this, but we see no reports of riots or looting.

We noticed neighbors taking care of neighbors. People were checking on each other to see if they had warmth, food, and electricity. There were people opening their homes and offices to friends and to total strangers. People offered hot meals and safe drinking water to those in need. We have opened “warming centers,” designated places where people could escape the freezing cold. The city and neighborhoods coordinated to set up more homeless centers.

It affected us all. As pains ran through our being, people reached out to others.

A driver noticed a tent with all the earmarks of being a homeless shelter. He stopped his car and checked on the homeless person. Then he went to fetch food to bring back to him. People went the extra mile despite the bitter cold.

A crowded grocery store lost power and could not

process the sales. The store manager let the people leave with what they needed without paying. And the people began paying it forward.

There are now teams of people assembling “flood buckets” and going into neighborhoods to assess the needs. The work continues in a spirit of neighborliness, cooperation, and generosity.

What does this have to do with Esperanto?

People are caring about other people, regardless of who they are, regardless of their age, color, creed, language, gender, politic, educational level, or status in society. People are crossing the barriers that might normally separate one class from another. These are people with a green heart, *La Verda Koro*. Some of them might already be “Esperanto speakers” but simply have not yet learned the language.

Through all the disruptions and crises that we face, we are reminded of our strong friendships in Esperanto. When I get messages from people asking how Beth and I are doing, my heart is touched by the kindness and thoughtfulness of friends we have met by means of Esperanto. When I see people helping one another in times of need, I am refilled with hope. I am reminded of our great family circle in *La Espero*:

La Espero (lasta strofo) de L. L. ZAMENHOF:

Sur neŭtrala lingva fundamento,
komprenante unu la alian,
la popoloj faros en konsento
unu grandan rondon familian.

Nia diligenta kolegaro
en laboro paca ne laciĝos,
ĝis la bela sonĝo de l' homaro
por eterna ben' efektiviĝos.

See you at the LK!! Ni vidos vin ĉe la LK de Esperanto USA!! **June 12-19, 2021.**

From the Board of Directors

Rubrika reveno

Charlotte estas Sekretario de E-USA. Oni povas kontakti ŝin ĉe liquidfireangel@gmail.com.

Post iom da frenezeco, mi revenas finfine al ĉi tiu rubriko. Mi nun estas instruisto de studentoj, kiuj aĝas 12-13 jaroj. Mi ankoraŭ instruas la anglan, ĉefe al studentoj kun lernaj handikapoj. Kiel kutime, mi ankaŭ laboras kun la estraro pri kiel plej bone helpi Esperantujon en Usono. Oni povas legi la protokolojn de niaj monataj kunsidoj ĉe nia retejo, danke al la mirinda Hoss. Krom tiuj kunsidoj per Zoom, ni ankaŭ ofte diskutas aferojn per Slack, por pli efike helpi kaj komunikiĝi. Legu tie, por vidi pri niaj grandaj ideoj (kiuj ne ĉiam rezultas simile grande). Se vi havas iujn ajn ideojn, pri kiel pli bone helpi la movadon en Usono, bv sendi retmesaĝon al ni, aŭ al nia kara rajtprotektanto, ombudsman@esperanto-usa.org.



— Charlotte BURTON, Sekretario

Contests, blogs, and books

Hoss is one of the Directors of E-USA. You can contact him at hoss@lodestone.org.

[*Esperanto-versio estas havebla en la reta versio de la bulteno.*]

In the previous column I mentioned that we've started using an online, asynchronous forum (Slack) for official business in order to relieve the bottleneck of our once-monthly Zoom meetings. Unfortunately, adoption of the the tool has been slow so far. Everyone's busy of course, with other obligations besides Esperanto-USA. But still, the slow progress makes it easy to grow impatient.



Video contest

We've just launched a video contest led by our very talented Alex Miller; You can find details on the [contest page](#). (See *About us > Film festival*.) Hopefully it will generate some creative contributions. Alex has done great work in planning the contest, drafting rules, producing advertising materials and sample films, and generating interest. My much smaller contribution has been in translating the rules, creating the associated web pages, and promoting the contest on our social media channels.

Now we need your help in getting the word out—and in contributing entries, too!

Blogs

I've expanded the scope of our RSS-aggregator, the program that monitors member blogs and promotes their most recent posts on our home page. The aggregator can now follow not only blogs, but almost any web resource that generates a syndication feed—including YouTube channels, podcasts, and even Reddit forums. On our home page you'll now find many more links to member content. On our blog page (see *About us > Blog posts*) you can see which blogs we currently follow, and learn how you can add your own to the list.

Books

For over a year I've been working on a project to get Esperanto-USA back into publishing. Ideally this effort will eventually include new translations, prose, and poetry, but for now the focus is on restoring classics of Esperanto literature in low-cost (or free) print and electronic forms. Why look backwards? Because sadly, most of Esperanto's literary canon is simply no longer available, and new generations of speakers are losing their link to a rich literary culture. My first priorities are the prose titles in William Auld's *Baza legolisto*, only 13 of which (out of 31 total) remain available in book services.

One of my favorites is Marjorie Boulton's short story collection *Okuloj*. It went out of print many years ago, and can now be found only through interlibrary loan. After contacting EAB, which holds the rights to

Boulton's works, Edmund Grimley Evans kindly agreed to put the book back in print. Tim Owen scanned a copy from the Butler library in Barlaston, the scan was converted to text by OCR software, and over several months we carefully proofread everything multiple times to weed out scanning errors. In the process, we even found a few mistakes in the original print run. A new edition should be back in print sometime soon; hopefully there will be an ebook version as well.

In 2020 I was also fortunate enough to receive permission from the great Vilmos Benczik—who tragically **passed away this month**

<<https://uea.org/gk/932a1>>—for Esperanto-USA to

carry on his wonderful *Fenikso* project, another attempt to keep the *Baza legolisto* in print. In the 1990s Benczik republished several entries by Julio Baghy, and I hope to make these available again in a well-proofed digital edition that can be distributed as free ebooks and low cost (no-profit) print-on-demand editions.

As with many classics, the original printing plates have been lost. So the books need to be scanned from paper, converted to text, and then carefully proofread. The first two steps are the easiest; it's the proofreading that takes the most work. If you'd like to help, please let me know!

— Hoss FIROOZNA, Direktoro

La vivo de Peĉjo


Ĝercoj • Timothy BORONCZYK



Teksto kaj ideo de Timoteo; desegnaĵoj de "Awesome Satyr". (Kaŝnomo, kompreneble. Timoteo klarigas, ke la artisto preferas resti anonima.)

Memoroj de uragano Audrey

loke • Fred MEYER, III



Radar-bildo de uragano Audrey antaŭ alteriĝo.

Tiu ĉi estas rakonto pri la memoroj de mi kaj mia estonta edzino Susan pri Uragano Audrey en Junio, 1957 kiam ni estis naŭ-jaraj.

Uragano Audrey estis unu el la plej pereigaj ŝtormoj en la historio de Usono; ĝi mortigis 416 homojn. Susan kaj mi klare memoris tiun eventon.

Mia familio kaj mi loĝis en Port Arthur, Teksaso, kiu estas proksimume 20 mejlojn for de la Meksika Golfo. Port Arthur estas je la marnivelo. Pro tio ekzistas mar-digo ĉirkaŭ Port Arthur kaj kelkaj najbaraj urboj. La decido resti en Port Arthur dum uragano eble estis la plej malbona decido de miaj gepatroj kiam mi estis juna. Nu, de mia patrino kaj mia duonpatro. Ĝi estis malbona decido de multaj aliaj homoj, kiuj tiam loĝis en Port Arthur. Ĝi estis la decido ankaŭ de la gepatroj de Susan. Ŝia familio loĝis en Bridge City, Teksaso, proksimume 10 mejlojn for de Port Arthur, kaj proksimume 10 futojn super la marnivelo.

Mi ne volas tro kritiki. Mia duonpatro kaj mia bopatro estis anoj de la generacio de la dua mondmilito, la Plej Nobla Generacio. Mia bopatro estis en la mararmeo en la Pacifiko. Mia duonpatro estis en la armea aerkorpuso. Li pretigis la aviadilon *Enola Gay* por iri al Japanujo. Kaj mia duonpatro kaj mia bopatro konstruis siajn proprajn domojn. Tio estis ebligita de la leĝo "GI Bill" kaj necesigita pro la

relativa manko de domoj en Usono post la milito. Sed tiuj estas aliaj rakontoj.

Mia familio tiam luis domon kun ligna ekstero. Ĝi havis salonon, manĝoĉambron, kuirejon, du dormoĉambrojn, koridoron, kaj banĉambron. Estis aparta aŭtejo por unu aŭto en la malantaŭa korto. Mi memoras, ke la murpapero en la salono estis verda. Mi ne memoras la kolorojn de la aliaj ĉambroj; nur tiun de la salono. La interkovraj (angle, *shiplap*) tabuloj sur la ekstero de la domo estis horizontalaj, sed la tabuloj malantaŭ la murpapero iris oblikve inter plafono kaj planko.

Komence de la uragano, miaj familianoj estis en diversaj ĉambroj en la domo. Sed kiam la vento fariĝis ventego, ni ĉiuj iris al la koridoro por esti sekuraj. Ĝi estis en la mezo de la domo kaj ne havis eksterajn murojn. Mi sidis surplanke ĉe la fino de la koridoro, fronte al la salono. Unue mi vidis la eksterajn murojn de la salono fleksiĝi ses colojn enen. Poste, oblikvaj ŝvelantaj strioj formiĝis sur la murpapero. Fine, inter la tabuloj, akvo enŝprucis tra la murpaperon. La ŝprucado ripetiĝis ĉiujn kelkajn minutojn dum kelkaj horoj kiam tavoloj de pluvo frapis la domon. Mi timis, ke la muro rompiĝos. Ni ĉiuj silente sidis tie en la koridoro rigardante la muron.

Kiam la vento malpliĝis, ni kontrolis, ĉu la domo estis difektita. Ni estis bonŝancaj. Neniuj fenestroj rompiĝis. La aŭteja pordo estis iom difektita, sed la aŭto estis en bona stato.

Mia duonpatro decidis, ke ni ĉirkaŭveturu por vidi la staton de Port Arthur kaj la proksimaj urbetoj. Ni vidis multajn arbojn kuŝantaj sur la tero kaj sur domoj. En multaj kazoj, falo de arbo rompis tegmenton. Sed la plej grava damaĝo, kiun ni vidis, estis en la urbeto Groves, Teksaso. Tie multaj domblokoj estis tute detruitaj. Nenio restis staranta sur la betonaj slaboj. Ankaŭ la najbara urbeto Port Neches havis iom da tia damaĝo. Ni aŭdis poste, ke estis tornadoj ene de uragano Audrey, kiuj detruis tiujn domojn. Ni sentis nin bonŝancaj, benitaj. Ni ankoraŭ havis lokon por loĝi.

La domo de Susan estis en Bridge City, Teksaso. Mia estonta bopatro finis konstruon de tiu domo antaŭ kelkaj monatoj. Ĝi estis bela domo kun brika ekstero sur betona slabo. Ĝi entenis salonon, kombinaĵon de manĝoĉambro kaj neformala ĉambro, kuirejon, koridoron, tri dormoĉambrojn, kaj banĉambro. Estis du grandaj fenestroj en la domo, unu en la salono kaj dua en neformala ĉambro. La aŭtejo ne estis aparta konstruaĵo, sed alfiksis. Estis ankaŭ aparta metiejo kie multaj aferoj por la domo estis konstruitaj.

Ĝuste antaŭ ol oni aŭdis, ke Audrey alteriĝos en sudorienta Teksaso kaj Luiziano, la onklo de la patro de Susan venis por viziti, kaj vidi la novan domon. Tiu onklo kaj lia familio estis parencoj proksimaj al la patro de Susan. Li loĝis kun ili dum jaro de sia kreskado. Parte pro la vizito, la patro de Susan ne devis labori en la petrolrafinejo dum la uragano. Oni ĝenerale ne scias, ke laboristoj en petrolrafinejoj devas resti tie kiam uragano frapas. Ili ne povas hejmen iri pro la danĝero de veturado dum uragano, kaj pro la bezonoj de la rafinejo. Tio okazis nek al mia duonpatro ĉe DuPont nek al la patro de Susan ĉe Texaco dum Audrey.

La gepatroj de Susan pretigis la domon por la uragano. Ili kovris grandajn fenestrojn per lanugaĵoj kaj peplomoj. Ili ankaŭ provis preventi envenon de akvo sub la pordojn. Domoj sur betonaj slaboj estas pli proksimaj al la grundo ol lignaj domoj.

Malkiel Port Arthur, la okulo de uragano Audrey pasis tra Bridge City. La ventoj de la okcidenta okulmuro de Audrey pasis tra Port Arthur. Kvankam okulmuraj ventoj estas la plej fortaj en uragano, ventoj en la okcidenta okulmuro estas malpli fortaj ol tiuj en la orienta. Tial la orienta flanko de uragano estas pli detrua ol la okcidenta. Do la damaĝo en Cameron, Luiziano estis tuta. Cameron estas ĉe la marbordo. Estis ponto trans lago Sabine en Port Arthur. Ĝi kondukis al vojo laŭ la marbordo al Cameron. La plejparto de la mortoj dum Audrey okazis en Cameron. Mi memoras la serĉon por postvivantoj en Cameron tagon post tago post Audrey. Ĝi estis korŝira.

Kiam la ventegoj venis, Susan estis scivola. Ŝi rigardis malantaŭ la kovriloj de la grandaj fenestroj. Ŝi vidis, ke la grandaj vitropaneloj fleksiĝas. Estis bone, ke ili ne rompiĝis. Susan memoris, ke ŝia patrino avertis ŝin ne denove faru tion. La plej memorinda evento okazis kiam la okulo de Audrey situis super la domo. La vento subite ĉesis. La onklo de la patro de Susan iris el la domo kaj anoncis, ke li kaj lia familio foriros. La patro de Susan petegis al li ne foriri. Li diris, ke la vento revenos same forta de la kontraŭa direkto. Finfine la onklo estis persvadita reveni en la domon. Estis grandega kverko en la antaŭa korto, eble 40 futojn alta. Ĝi falis en okcidentan direkton antaŭ la alveno de la okulo. Ĉiuj estis dankaj, ke la arbo ne falis sur la domon, rompante la novan tegmenton. Tuj post kiam la vento denove ekblovis, la kverko denove ekstaris vertikale kaj falis en orientan direkton. Tio komplete konvinkis la onklon resti en Bridge City plian tagon.

Susan kaj mi unue renkontiĝis la sekvan jaron, kiam ni havis dek jarojn. Mia familio transloĝiĝis al Bridge City post kiam mia duonpatro veterpretigis kaj plejparte kompletigis konstruon de nia domo tie. Mi memoras, kiam mi marŝis laŭ la lerneja koridoro, parolante kun ŝi kaj tenante ŝian manon.

Ambaŭ domoj suferis damaĝon pro inundo kaj ventego en sekvaj uraganoj, ekzemple Rita kaj Ike. Estas multaj similecoj inter uragano Audrey kaj la lastatempa uragano Laura. Cameron estis denove difektita, kaj ankaŭ Lake Charles, Luiziano. Sed en Bridge City, mia frato facile transvivis. La okulo de uragano Laura alteriĝis apud Cameron. Cameron evakuiĝis. Kaj malpli multaj homoj mortis rezulte de Laura.



Fred MEYER, III

Fred estas emerita teoria fizikisto kiu laboris ĉefe en la duonkonduktaĵa industrio. Li eklernis Esperanton en 1966 kaj uzas ĝin de tiam. Li ĝuas verki en Esperanto kaj traduki Esperanten. Amikeco inter homoj kaj la disvolviĝo de ties lingvoj kaj kulturoj ankaŭ tre interesas lin.

f3meyer@texoma.net

Mikronoveloj

Mikronoveloj estas ege koncizaj rakontoj, ofte malpli ol 300 vortojn longaj. Por nia mikronovelo-rubriko ni aldonas kroman defion: rakontoj devas esti precize 100 vortojn longaj – nek pli, nek malpli.

Ĉu vi emas verki tiel? Sendu viajn centvortaĵojn al la redakcio (trovu la adreson en la kolofono), kaj eble ili aperos en venonta numero!

“Ho, mia kor’!”

Mi amis ŝin. Tio estas certa.
Tio devas esti certa, aŭ mi freneziĝos.



Fojfoje ni kverelis.
Kompreneble. Ĉiu paro kvereleas. Tio signifas nenion. Tio signifas nur, ke ni ambaŭ estis emocio-riĉaj homoj. Neniam mi povis dolorigi ŝin, nek ŝi min.

Do ne estis ŝi, kiu priridis min en la ĝardeno. Ne estis mi, kiu havis tranĉilon ĉemane. Ne estis ŝi, kies sango ekfloris kiel rozoj. Ne estis mi, kiu mortigis ŝin.

Tio estas aĉa mensogo.

Tamen nun la dratoj de la mensogdetektilo premas sin kontraŭ mia frunto. Mia amo premas sin kontraŭ mia koro.

Ne batu maltrankvile.

Ne batu.

Ne ...

— Donald Jacob *UITVLUGT donaldjacobuitvlugt@yahoo.com*

La tombisto

“Nu, se oni devas fosi tombon”, pensis la tombisto, rigardante la ĉirkaŭaĵojn, “jen sufiĉe bela loko, mi supozas”. La mezaĝulo denove turnis sian atenton al la laboro, ĝuante la



freŝan aeron.

Li faris malmulton por distri sin kaj malemis al diboĉado (kvankam li neniam rifuzis glason da biero, kaj pro sia vetemo li eble ŝuldis iomete tro). Li taksus sian vivon simpla, kaj, almenaŭ ĝis tiu punkto, enuige senaventura.

“Ĉu jam sufiĉas la profundo?”, li demandis petmiene al la viro kiu gvatis la fosadon.

“Sufiĉas”, replikis seke la sikario, kiu indikis per sia pistolo, ke la tombisto eniru la truon.

— Rafa *NOGUERAS rafaeln1@gmail.com*

Viruso

La prezidento kunsidis kun la plej altrangaj kuracistoj. Estis urĝe decidende kiel pritrakti viruson, kiu disvastiĝis en urbeto meze de la lando.



Ĉu sciigi novaĵagentejojn?

“Diru sincere – kiaj estas la danĝeroj de tiu abomeninda viruso?”

La ĉefkuracisto apenaŭ kuraĝis respondi. “Ĝi transiŝiĝas dum renkontiĝoj, kiam infektita homo ekparolas ian strangan lingvon. Ĝi iradas de homo al homo, ne bezonante kontakton.”

“Post tia babilado, ne plu eblas haltigi tiun lingvaĉon – pardonon – viruson.”

“Diable. Se tiu viruso venkos nin, la mondo falos en kompletan ĥaoson. Baldaŭ ne plu estos muroj inter la homoj.”

Oni ne sciigis novaĵagentejojn. Por savi la mondon – kompreneble.

— Maurizio *GIACOMETTO mbaesperanto@btinternet.com*

A sucking chest wound of a challenge

traduku! • HOSS FIROOZANIA

La rubriko *traduku!* prezentas al vi diversajn tradukdefiojn. En paraj numeroj aperas tekstoj en Esperanto por enangligi; en neparaj, tekstoj en la angla por elangligi. Leginte viajn respondojn ni faros resumon de la diversaj provoj kune kun niaj reagoj, komentoj, kaj proponoj.

Lastatempe alvenis reago de aŭtoro Anna LÖWENSTEIN al la artikolo en N^o 2020:2 pri la relativaj (mal)facilecoj de tradukado el la angla al Esperanto kaj inverse. Anna famas interalie pro siaj originalaj romanoj en Esperanto, inkluzive de **La ŝtona urbo**

<<http://amzn.com>

/B08FCRRVL3>, kiun ŝi eldonis ankaŭ en anglalingva


formo <<http://amzn.com>

/B01CYUN0AU>. Ŝi skribis:

Homoj ofte demandas min, kial mi verkis miajn romanojn unue en la angla kaj poste tradukis ilin en Esperanton. [...] mi pensas, ke estus tre malfacile traduki ilin el Esperanto en ian anglan, kiu sonus tute nature. Tio ne estas la ĉefa kialo, kial mi verkis ilin en la angla, sed mi tamen estas konscia pri tiu malfacilaĵo.

Interese, ĉu ne? Do ne hontu, bravaj tradukantoj, se vi devas barakti por redoni Esperantan tekston en natura anglalingva formo; la tasko baraktigas eĉ niajn plej talentajn anglalingvanojn. (Kaj ne hezitu partopreni en niaj tradukdefioj – eĉ baraktante!)

Ĉi-numere ni revenas al longe neglektita eltiraĵo aperinta en N^o 2020:3, el la romano *Little Brother* de Cory DOCTOROW. Ĝi estis vere malfacila teksto, plena je modaj idiomaĵoj kaj elvokivaj metaforoj. Korajn dankojn kaj gratulojn al tradukintoj BA, BS, JN, kaj SD: mirinde, ili ĉiuj kuraĝis ataki la tutan tekston. Jen kelkaj el la plej interesaj esprimoj el la originalo kune kun iliaj proponoj:



Little Brother de Cory DOCTOROW prezentas tekston riĉan je idiomaĵoj kaj freŝaj metaforoj.

Cesar Chavez high in San Francisco's Mission District — Ve, tuj leviĝis la malnova dilemo pri propraj nomoj. Tri el kvar tradukintoj elektis esperantigi, redonante ekzemple *Cezaro Ĉaves*, *Cezaro Ĉavezo*, *Sizar Ŝavez*, *distrikto Miŝon*, *distrikto Misio*, kaj simile. SD elektis hibridan solvon, aldonante ankaŭ la originalan literumadon inter parentezoj.

Estas pravigeble esperantigi la nomojn, sed ankaŭ estas pravigeble lasi ilin senŝanĝaj. Memoru, ke kvankam la fama tradukisto William AULD entuziasme subtenis esperantigon de propraj nomoj en siaj tradukoj, lia argumento celis precipe nomojn fikciajn. Por nefikciaj nomoj la demando estas pli tikla.

Feliĉe la nomoj ĉi-kaze jam plejparte konformas al la ortografio de Esperanto, do espereble la nacilingvaj formoj ne starigas grandan obstaklon por internacia legantaro.

a (high school) senior — Ĉiuj donis similajn solvojn: *lernejano de la plejalta klaso de liceo*; *supera klasano ĉe la gimnazio*; *en la lasta jaro de la gimnazio*; *altnivelulo ĉe la gimnazio*.

Estas malfacile kapti la precizan ideon de la usona *high school* en Esperanto pro diferencoj inter internaciaj eduksistemoj. Foje oni parolas pri usonaj *gimnazioj* kaj *liceoj*, sed efektive tiuj vortoj nomas nivelojn de eŭropaj lernejoj, kiuj ne rekte paralelas la usonan sistemon. Se la preciza usona senco de la eduknivelo ne tiom gravas al la rakonto, eble ĝi estu *mezgrada lernejo* aŭ simple *mezlernejo*.

surveilled — Unu tradukinto klarigis ĉirkaŭfrazo per *rigardataj de potenculoj*. Alia elektis la kunmetitan *observadataj*. Ambaŭ en ordo; *surveillance* ja estas formo de zorga kaj daŭra rigardo aŭ observo, ofte fare de potenculoj. Sed la ago enhavas ankaŭ nuancon de io kaŝa, kontrolo, aŭ spiona, ĉu ne? Tial plej plaĉas al mi la elekto de BS kaj JN, *gvatataj*.

behind the curve — Jen unu el multaj idiomaĵoj kiuj estus tute ne kompreneblaj en laŭvorta traduko.

Niaj tradukintoj estis saĝaj, tamen, elektante *ekscias pri novaj aferoj malfrue, sufiĉe sensaĝa*, kaj *eksmoda*. Aparte plaĉas la metaforo de SD, *sufiĉe dinosaŭras*.

a clueless disciplinary officer — Ŝajne *clueless* estas relative nova esprimo en la angla. Laŭ *Google Books Ngram Viewer*, reta ilo kiu kalkulas relativajn frekvencojn de vortoj en eldonitaj verkoj, la vorto **komencis enmodiĝi nur ĉirkaŭ la jaro 1990** <<https://bit.ly/3bb0e6k>>. Ĝia senco estas iom nebula, kun nuancoj de *senscia, senkomprena, nekonscia (pri io)*, ks. Niaj tradukintoj proponis: *senscia punoficisto, stulta disciplina funkciulo, idiota respondeculo*, kaj la bele aliteracia *dupa disciplinisto*.

a sucking chest wound of a human being — Kvankam la angla estas jam plenplena je regurditaj metaforoj, tiu ĉi ŝajnas tute freŝa. Ĝi eble plaĉus al George ORWELL, kiu fame plendis pri trouzo de eluzitaj esprimoj jam delonge perdintaj sian elvokivecon. Sed ho, kiel traduki ĝin en internacie komprenebla maniero? Oni proponis: *malplaĉega homaĉo; kiel pus-gutiga ulcero; aĉe aĉega aĉulo* (tre bonlingvisma); *kiel putra, malferma vundo*. Bele! (Aŭ eble “bele malbele!”)

Ŝerce, BS proponis ankaŭ: *li estas Idisto ...*

a jailer — *gardisto, karcerestro, prizongardisto, enkarcerigulo*. Ĉiuj bonaj provoj, sed jam ekzistas tute ekvivalenta – kaj eĉ zamenhofa – vorto por ĝi en Esperanto: *provoso*.

better a clueless one than one who's really on the ball – *plibonas havi (iun) mallertan ol lertan; prefere havu idioton ol tre lertan ruzulon; pli bone ke li estos seninforma ol vere vigla; prefere stultulo ol lertulo*.

PA (Public Address system) — Tiu aparato estas bone konata afero en la angla, sed ĉu en Esperanto? La tradukintoj elektis *anoncilo, laŭtparolilo(j)*, kaj *aŭd-parol-sistemo*.

(sounds) like someone struggling to digest a bad burrito — Ĉu *burrito* estas manĝaĵo internacie konata, aŭ ĉu nur inter usonanoj kaj meksikanoj? Kelkaj tradukintoj provis eviti la kulturan dependecon: *kiel la muĝetado de ventro kiu penas digesti malfreŝan viand-bulkon; kvazaŭ iu penus*

digesti malbonan meksikan manĝaĵon; kaj similas al sono de persono kiu strebas digesti malbonajn fazeolojn. BS elektis esperantigi la nomon: *similas al iu klopodante digesti malbonan buriton*.

audio confusion — Inter la proponoj estis *malklara bruo, brua malordo*, kaj *aŭda tohuwabohuo* (de JN, kiu evidente tre ĝojis trovi okazon uzi tiun amuzan vorton). SD donis interesan proponon: *galimatio*. Laŭdifine la vorto signifas “konfuzega, sensenca, tute nekomprenebla diraĵo aŭ skribaĵo”, sed figure oni uzas ĝin por priskribi ankaŭ konfuzajn sonojn.

a survival trait — *havenda trajto de/por pluivivi/pluivado; evolua transviva trajto; kaj transvivdonita trajto*.

blow my downloads — Idiomaĵo vere novepoka. Oni proponis: *perdi/fuŝi miajn elŝut(it)ajojn kaj interrompi mian elŝutadon*. Plaĉas la solvo de SD: *fuŝperdi miajn elŝutojn*.

Kaj jen provo kunfandi la diversajn provojn en unu sintezan tekston (laŭ mia propra, arbitra gusto):

Mi estas supera klasano ĉe la lernejo Cesar Chavez en la sunoplana Mission-distrikto de Sanfrancisko, kaj pro tio mi estas unu el la plej gvatataj homoj en la mondo. Mia nomo estas Markuso Jalo, sed kiam ĉi tiu rakonto komenciĝis, mia kromnomo estis V1n5t0n0. Prononcata kiel “Vinstono”.

Ne prononcata kiel “Vo-unu-no-kvin-to-nul-no-nul” – krom se oni estas senscia disciplinisto tiel dinosaŭra, ke li ankoraŭ nomas Interreton “la informa ŝoseego.”

Mi konas ĝuste tian sensciulon, unu el tri viclernejestroj de Cesar Chavez, kaj lia nomo estas Fredo Benson. Li aĉas kiel putra vundo. Sed se oni devas havi provoson, prefere tiu estu stultulo ol lertulo.

“Markuso Jalo”, li anoncis iun vendredan matenon per la lernejoj laŭtparoliloj. Ili jam apenaŭ funkcias, do kune kun lia kutima murmuraĉo, la rezulto sonas pli simila al klopodo digesti malbonan buriton, ol lerneja anonco. Sed homoj povas lerte distingi siajn nomojn en brua malordo

– tio estas trajto necesa por pluivado.

Mi kaptis mian sakon kaj tri-kvarone fermis mian tekokomputilon – mi ne volis fuŝperdi la elŝutojn – kaj preparis min por tio, kio nepre okazos.

“Prezentu vin en la administrejo – tuj.”

Interese, *Little Brother* estas jam tradukita en Esperanton fare de la ege talenta Edmund Grimley EVANS el Britujo. Li disponigas ĝin senpage, do eblas legi **la tutan romanon rete** <<https://rano.org/frateto/>>.

Por tiuj, kiuj volas kompari lian tradukon kun la aliaj, en la reta versio de la artikolo vi trovos ligan al paralela prezento de la tekstoj.



La nova defio

Jen eltiraĵo el *Three Vagabonds of Trinidad* <<https://bit.ly/3r8zyFE>> (1901), klasika novelo de Bret HARTE. La teksto prezentas *Li Tee*, petoleman fileton de ĉinaj enmigrintoj al Kalifornio, kiu nun estas orfa kaj senhejma. Li ankoraŭ ne bone regas la anglan, parolante piĝinan (kaj stereotipan) dialekton. Memoru: ne necesas traduki la tuton; ni ĝoje akceptos ankaŭ fragmentojn. Do ne hezitu provi!

“Oh! it’s you, is it?” said the Editor.

The Chinese boy to whom the colloquialism was addressed answered literally, after his habit:—

“Allee same Li Tee; me no changee. Me no ollee China boy.”

“That’s so,” said the Editor with an air of conviction. “I don’t suppose there’s another imp like you in all Trinidad County. Well, next time don’t scratch outside there like a gopher, but come in.”

“Lass time,” suggested Li Tee blandly, “me tap tappee. You no like tap tappee. You say, alle same

dam woodpeckel.”

It was quite true—the highly sylvan surroundings of the Trinidad “Sentinel” office—a little clearing in a pine forest—and its attendant fauna, made these signals confusing. An accurate imitation of a woodpecker was also one of Li Tee’s accomplishments.

The Editor without replying finished the note he was writing; at which Li Tee, as if struck by some coincident recollection, lifted up his long sleeve, which served him as a pocket, and carelessly shook out a letter on the table like a conjuring trick. The Editor, with a reproachful glance at him, opened it. It was only the ordinary request of an agricultural subscriber—one Johnson—that the Editor would “notice” a giant radish grown by the subscriber and sent by the bearer.

“Where’s the radish, Li Tee?” said the Editor suspiciously.

“No hab got. Ask Mellikan boy.”

“What?”

Here Li Tee condescended to explain that on passing the schoolhouse he had been set upon by the schoolboys, and that in the struggle the big radish—being, like most such monstrosities of the quick Californian soil, merely a mass of organized water—was “mashed” over the head of some of his assailants. The Editor, painfully aware of these regular persecutions of his errand boy, and perhaps realizing that a radish which could not be used as a bludgeon was not of a sustaining nature, forebore any reproof. “But I cannot notice what I haven’t seen, Li Tee,” he said good-humoredly.

La redakcio (trovu la adreson en la kolofono) akceptos vian tradukon **ĝis la 15-a de Majo**. Ne necesas sendi plenan tradukon, se vi ne kapablas aŭ volas; ni akceptos ankaŭ fragmentojn. Sed ĉiuokaze bonvolu sendi **nur unu** tradukon, ne plurajn diversajn provojn. Sukceson!

Spegulaj tonoj

beletre • Sheila DEVLIN

Jen la poemo “Memore” de Johán VALANO (alinome Claude PIRON) el lia poemaro *Malmalice* (Vieno: IEM 2001):


*Kiel delikate
la luno
desegnas ombbron
de branĉetoj junaj
sur mia kurteno
ora*

*tiel delikate
la nuno
revekas
nombron
de memoroj
lumaj
pri nia kunteo
kora.*

La spegulaj strofoj de Valano revekis memorojn pri muzika kurso en kiu mi lernis pri “planedaj gamoj”. Gamoj devenas de la mezepokaj modaloj, kaj la termino “planeda gamo” venas de kurso instruita de la *Lyre Association of North America* (LANA).

Mezepoke, oni kantis uzante sep modalojn, kaj ĉiu havis malsaman sinsekvon de intervaloj supren tra okto. La intervaloj estas duto (1), kaj duonduto ($1/2$) – la plej malgranda distanco inter du tonoj en okcidenta muziko. En la dora modalo, la sinsekvo de intervaloj estas $1-1/2-1-1-1-1/2-1$: alivorte, la du duondutoj troviĝas inter la dua kaj tria tonoj, kaj la sesa kaj sepa tonoj. Por ĉiu modalo ekzistas “planeda gamo” kun la sama sinsekvo de intervaloj, sed irantaj malsupren.

Jen eksperimento, kiun vi povas fari ĉe piano. Metu unu fingron de la dekstra mano kaj unu de la maldekstra mano sur D-klavoj je distanco de du oktoj. Ambaŭmane, malrapide kaj kontraŭdirekte, premu la najbarajn blankajn klavojn laŭvice – unu mano irante supren, la alia malsupren. Vi ĉiam premos blankajn klavojn, farante po ok tonojn per ĉiu



Malmalice estas **aĉetebla papere de UEA** <<https://bit.ly/3ejfA7U>> kaj libere **elŝutebla en PDF-formo**

<<https://bit.ly/3rpE2b7>> danke al EAB.

mano. Eble helpos, se vi samtempe diros “unu, du, tri” ktp. Rimarku, ke kiam vi renkontas duonduton per la maldekstra mano, vi samtempe renkontas duonduton per la dekstra. Jen la klavoj, kiujn vi premos:

Per la maldekstra mano, suprenirante: (duondutoj inter E kaj F, B kaj C)

D E F G A B C D'

Tio estas la originala dora modalo.

Per dekstra mano, malsuprenirante:

D' C B A G F E D

Tio estas la responda planeda gamo.

Rimarku, ke en tiu ĉi eksperimento vi ne uzas nigrajn klavojn por fari la spegulan planedan gamon. Tio okazas ĉar mi elektis la doran modalon: ĝi estas simpla modalo por krei planedan gamon, aparte se oni komencas je D. La sama ne validas por aliaj modaloj, ekzemple eola, friga, lida, aŭ lokra. En tiuj modaloj, la planeda gamo bezonas nigrajn klavojn por krei spegulan formon. Ekzemple, uzante la ionan modalon je C (C D E F G A B C') kun nur blankaj klavoj, la responda planeda gamo (C' B \flat A \flat G F E \flat D \flat C) havas kvar nigrajn klavojn.

Nu, kiel mi traktis la diferencon inter seslinia strofoj de Valano kaj la ok tonoj de la dora modalo? Mi iomete rearanĝis la vortojn laŭ la tonoj:

D *Tiel deli-*
E *kate, la*
F *nuno re-*
G *vekas, nombbron de me-*
A *moroj, lumaj pri*
B *nia kun-*
C *teno*
D' *kora.*

D' *Kiel deli-*
C *kate, la*
B *luno de-*
A *segnas, ombbron de bran-*
G *ĉetoj, junaj sur*
F *mia kur-*
E *teno*
D *ora.*


Do, mi vestis la poemon per modalaj kaj gamaj tonoj.
Eble oni volas krei ĉarman melodion kiu akordas kun
la poemo.

*En la reta versio de la artikolo vi trovos ankaŭ son-
registraĵon, kiun Ŝila kreis por demonstri la
planedan gamon. —Red.*

Krucvortenigmo

enigmoj • Timothy BORONCZYK

Jen nova krucvortenigmo danke al Timoteo BORONCZYK. Inter la solvintoj ni lotumos \$10-rabaton de la libroservo. Ĉiuj membroj rajtas partopreni, sed solvoj nepre alvenu al la redakcio, aŭ poŝte aŭ rete, **antaŭ la 15-a de Aprilo**. Bonŝancon!



Horizontale

1. Cirklo aŭ kvadrato, ekz.
5. Ĉirpema insekto
9. Homoj sen rajtoj
14. La plej frua
15. Peli boaton
16. Maldoneme
17. Kunkudrita foliaro
18. Senkondiĉa ordono pagis monsumon
19. Fluganta armilo
20. Efiki al io per likvo
22. Elkonduki likvon
23. Seka kiel dezerto
24. Plena kredoj
25. Hebrea liturgia himno
28. Aperturo en muro
32. Lokoj kie pneŭo siblas
33. Malinternoj
37. Rapide piediri
38. Dimensio vertikala
39. Rilata al oficisto, kiu interalie atestas kaj subskribas
41. Altgrada atento de la publiko
42. Urbo en norda Novmeksiko
44. Por pirato, posedanto pli grava ol oro
45. Resono
46. Flavoranĝa frukto
48. Surskriboj sur koverto

50. Malnova eŭropa mezurunuoj de pezo
51. Kovri nudecon
54. Grava ceremonio
57. Ĥoranoj
61. Aliflanke de
62. Moviĝoj por atingi ion
63. Socia malpermesoj
64. Malkvietigi
65. Havanta multajn malgrandajn truojn
66. *La Hobito*, aŭ tien kaj _____
67. Elementoj n-ro 28
68. Muzika intervalo inter *do* kaj *mi*, ekz.
69. Apartenanta al aliaj

Vertikale

1. Atmosfera elektra malŝarĝoj
2. Apartenanta al iu ne menciita
3. Rusa monunuoj
4. Oceano gustigaĵoj
5. Bleki kiel korvo
6. Ĝis la _____
7. Nereala
8. Paska floro
9. Grasa fiŝoj foje enskatoligita
10. Geneza pluvodaŭro, en tagoj
11. Servistoj ĉe riĉuloj
12. Sporta kunvenoj
13. Riski monsumon en ludo
21. Heraldika mustelo
24. Rilata al senlabora(j) tago(j)
25. Ebena, glata
26. Parola songrupo
27. Rolanto
28. Ĉesigo
29. Dolora sento
30. Spirtuboj
31. Sendita kambio por pagi ŝuldon
34. Tirkestaroj
35. Manieroj en kiu staras afero
36. Tropika radiktubero
40. Nesentemo
43. Malbrue
47. Proponoj pri kion oni faru
49. Deturni ies atenton
51. Grado de taksebleco
52. Moviĝoj internaj
53. Vojoj inter konstruaĵoj
54. Elementoj n-ro 50
55. Diboĉa festoj
56. Ne klerikoj
57. Subita preno
58. Malnova ĉina mezurunuoj de pezo
59. Agi kiel ordonite
60. Havanta malmultajn jarojn

Strange, sed vere

La rubriko *Strange, sed vere* prezentas mallongajn legaĵojn en facila Esperanto. Per vortoj de la Baza Radikaro Oficiala ni rakontas al vi strangajn novaĵojn tra la mondo. Se vorto ne estas trovebla en BRO, ni difinas ĝin. Vi povas trovi **senpagan BRO-vortaron rete**

<<https://bit.ly/37UCCyb>>, aŭ mendi **paperan libron de UEA** <<https://bit.ly/34VCv3r>>.

Agrabla estas gasto, se ne longe li restas

La 16-an de Januaro, laborantoj ĉe *O'Hare International Airport* en Ĉikago trovis suspektindan viron en privata parto de la flughaveno. Kiam ili petis de li identigilon, la viro montris oficialan karton, sed ĝi ne estis lia: ĝi apartenis al alia laboranto, kiu perdis ĝin en Oktobro, 2019. Policianoj poste arestis la viron pro senrajta eniro.



Aŭtoritatoj diras, ke la viro vojaĝis hejmen al Barato post kvinjara magistriĝo en Kalifornio. Li alvenis al O'Hare la 19-an de Oktobro el Losanĝeleso, sed pro timo de koronaviruso, li ne volis plu daŭrigi la vojaĝon. Do dum tri monatoj li kaŝis sin en privata parto de la flughaveno, ricevante manĝaĵon de bonkoraj vojaĝantoj.

La temo de liaj magistriĝaj studoj estis gastigado.

(*Laŭ raporto en Chicago Tribune, 2021-01-17.*)

arest/i

Kapti por malliberigi aŭ por submeti al juĝado.

magistr/o

iu, kiu ricevis universitatan atestilon malpli altan ol tiu de doktoro.

Bojas hundido, ĉar tiel faras la hundo

Russell JONES de Londono ĉagreniĝis: ial lia hundo Billy komencis piediri lame. Ŝajne la besto ne volis uzi unu el siaj kruroj, sed Russell ne povis diveni la kialon. Do li



portis la hundon al bestkuracisto, sed eĉ post multe da ekzamenado (kiu kostis al li £300), la kuracisto ne sukcesis trovi vundon.

S-ro Jones, tamen, havis rompitan maleolon. Li efektive portis pezan gipsobandaĝon, kiu malhelpis lian propran piediradon. La bestkuracisto konjektis, ke Billy simple volis imiti sian homan amikon.

Tiun konjekton Russell poste konfirmis: kiam li venontfoje promenigis la hundon, Russell sidis sur skotero anstataŭ piediri. Kaj tiam, mirinde, Billy piediris tute senprobleme.

(*Laŭ raporto de UPI, 2020-01-19.*)

gips/o

Pulvoro (CaSO_4), kiu kun akvo firmiĝas. Oni uzas ĝin por bandaĝi rompitaĵojn kaj por fari statuetojn.

skoter/o

Du-rada veturilo movata per motoro, simila al malgranda motorciklo.

Bona kloako-vino ĝis la fino

En Decembro, responde al averto de anonima informanto en Rainsville, Alabamo, polico serĉis industrian instalaĵon por purigo de kloak-akvo, kaj trovis tie kontraŭleĝan vinfarejon. La sekvan tagon oni akuzis la estron de la instalaĵo pri posedo de kontraŭleĝe farita alkoholaĵo kaj misuzo de sia ofico por profiti.



La vinfarejon oni trovis en malofte uzata konstruaĵo "kie tiaj aferoj okazas", diris la urbestro de Rainsville. Vino kaj aliaj alkoholaĵoj en Rainsville estis kontraŭleĝaj ĝis Septembro 2019, kiam la urba estraro finfine permesis ilin.

(*Laŭ raporto de WHNT, 2020-12-18.*)

anonim/a

Ne malkaŝanta sian nomon.

kloak/o

Kanalo, ordinare subtera, tra kiu elfluas la malpurajĵoj de urbo.

En ĉiu transloĝiĝo estas parto de ruiniĝo

La 16-an de Januaro en Pomona, Kalifornio, viro ŝtelis aŭton kaj multege klopodis por eviti kaptiĝon. Forkurante de policianoj, li eniris apartamentaron kaj trovis neŝlositan pordon. La loĝantoj de la apartamento ne estis ene, do la viro mem enloĝiĝis: li razis sian vizaĝon, alivestiĝis, kaj eĉ kuiris manĝaĵon



por ŝajni sin la vera loĝanto. Bedaŭrinde li ankaŭ bruligis la manĝaĵon, kaj pro la fumo alvenis fajrobrigadistoj. Finfine la viro estis kaptita; oni akuzis lin pri posedo de ŝtelita aŭto kaj kontraŭleĝa eniro.

(Laŭ raporto en *The Daily Bulletin*, 2020-01-18.)

brigad/o

Organizita grupo de laboristoj aŭ soldatoj, kune laborantaj sub unu ĉefo.

Kolofono

Redaktoro / Editor: Hoss FIROOZNA

Kontaktu nin: <bulteno@esperanto-usa.org>, aŭ:

Usona Esperantisto, c/o Hoss Firooznia
CMC #271205, University of Rochester
500 Joseph C. Wilson Blvd.
Rochester NY 14627-1205
United States of America

Usona Esperantisto estas la dumonata bulteno de Esperanto-USA. Bonvenaj estas kontribuoj kaj en Esperanto kaj en la angla. Prefere sendu materialojn retpoŝte, kaj aldonu viajn nomon, adreson kaj foton. Kun aliaj fotoj aldonu notojn pri datoj, lokoj, kaj nomoj de la foti(n)toj. Ni resendos poŝte senditajn materialojn se vi aldonas mem-adresitan, afrankitan koverton.

La enhavo de *Usona Esperantisto* estas reuzebla laŭ la permesilo CC BY-SA <<https://creativecommons.org/licenses/by-sa/2.0/deed.en>>. Ni petas, ke oni tamen atendu du monatojn antaŭ ol represi la plej freŝajn artikolojn.

Opinioj esprimitaj en *Usona Esperantisto* apartenas al la individuaj aŭtoroj, kaj ne nepre spegulas vidpunktojn de la redaktoro aŭ de Esperanto-USA.

Kontribuontoj eble volus legi la kalendaron de limdatoj kaj redakciajn konvenciojn en nia retpaĝaro.



Usona Esperantisto ("American Esperantist") is the bi-monthly magazine of Esperanto-USA. We welcome contributions in both Esperanto and English. Please send materials by email if possible and include your name, address, and photo. With other photos please include the photographer's name along with subject(s), location, and date. We will return mailed contributions if you include a self-addressed, stamped envelope.

The contents of *Usona Esperantisto* may be reused under the Creative Commons Attribution-Share Alike license <<https://creativecommons.org/licenses/by-sa/3.0/>>. We ask that you wait two months before reprinting the latest content, however.

Opinions expressed in *Usona Esperantisto* are those of the individual authors and do not necessarily reflect the views of the editor or of Esperanto-USA.

Contributors may want to consult the submission calendar and style guide on our website.

Esperanto, Passport to the Whole World

el la arĥivo

In this installment of *el la arĥivo* we travel back to 1996, when a pair of articles announced ELNA's long-anticipated video course, *Pasporto al la tuta mondo*—an enormous and remarkably ambitious project led by Lusi Harmon.

The videos and their accompanying learning materials were originally available only on DVD and CD, but today they can be accessed for free online. (See links below.)



For five years now ELNA has planned to prepare a course in Esperanto for television. Recently the planning firmed up, the text was written, rewritten, re-written and polished; and everything is now ready (except for the money) to push ahead with the project.

Esperanto, Pasporto Al La Tuta Mondo will be suitable for educational or cable television and is directed to adults, including students at the high school and university level. It consists of 15 half-hour lessons, using the direct method of language teaching so that the same tapes may be used anywhere in the world.

We want the lessons to have a sort of timeless quality, so that they may be used unchanged for many years. We want the lessons to have a continuing story line, which will hold the interest of the students. And—we want the lessons to be amusing.

The main actors are the six members of the Bonvolo family. Georgo, a Greek philosopher; Filiso, a classic ballerina; Roberto, a professional long-distance runner; Jolando, a race-track jockey; Heleno, an avant garde sculptress; and Donaldo, an adolescent but genius-level British-style judge. The family members wear unusual costumes, and act in original

and unusual ways. They are, after all, characters which we have invented; characters with universal appeal. In that way the course will not easily become dated.

The Bonvolo family is very interested in international cultural relations and during the course of the lessons experience many contacts—by mail, telephone, home visits, foreign visits and even ESP-visits—with foreigners equally fantastic and idiosyncratic in action. After many amusing meetings and partings all of the actors, major and minor, joyfully come together in the last lesson at an international convention.



Besides using the direct method, the lessons are structured on several other important methods of instruction such as dialogue subtitles, pattern phrases, word lists, pictures, maps, designs, and computer-created light effects. The video will be made digitally, in order that it may be later adapted to CD-ROM and interactive instruction. Workbooks are planned in Esperanto and the national languages to accompany the video courses.

Our team has already produced a 15-minute promotional video, which presents the project and is designed to help collect the necessary money for this

audacious project.

We invite the collaboration of the various national Esperanto organizations and/or individuals in the forthcoming creation of workbooks for the courses in the various national languages. The aim is that those collaborators themselves print the workbooks and copy the tapes without cost (or we will furnish at cost) for local use in those countries. This project is truly international, and the Bonvolo family hopes to create Esperantists throughout the world.



The 15-Lesson Videotape Course in Basic Esperanto

The course was conceived and written by Edwin Grobe. Each lesson is thirty minutes, making the total course length seven and a half hours. The direct method of instruction is used, meaning that the material on the tape is all in Esperanto. In some scenes the actors interact in a family framework, without directly involving the TV audience, while in other scenes they look and speak directly into the camera, interacting with the TV audience. Some lessons make use of both methods.

Costumes: Each member of the family dresses according to his or her professional role, and throughout the entire film wears the same costume, whatever the dramatic or social situation. The costumes, which include wigs and makeup, are somewhat burlesque-style, almost clownish; and define the personalities of the characters.

Subtitles: The important words and phrases are not only heard, but also seen in the form of subtitles.

Scenario: After the Bonvolo family is introduced, several lessons feature visits by various foreigners who are hosted by the family. Various family members befriend or even fall in love with some of the visitors and regret their having to leave. Some family members even threaten to leave the house and

run away to live with their new friends and lovers. Family unity is at risk. The family deals with the threat to its unity by deciding to take part in an international convention where they can again meet their departed friends. Lessons feature the execution of various strategies to raise the money needed to attend. The final lesson celebrates their success.

Grammar covered: Alphabet, numerals; nouns, -o and -oj endings; Adjectives, -a, -aj ending; Calendar, Clock; Verbs, -as ending; Accusative, -on, -ojn, -an, -ajn endings; Prepositions; Suffixes and prefixes; Combined words; Adverbs, -e ending; Imperative, -u ending; Past tense, -is ending; Future tense, -os ending; Conditional, -us ending; Recapitulation. (These are only the major themes. Additional themes will also appear in the various lessons.)

Financing

Each lesson costs US\$20,000. We aim to collect at least \$80,000 by spring 1997. At that time we will film the first four lessons, and will distribute copies to everyone who has pre-ordered them. Pre-orders can be purchased for \$75 for the four, or at \$250 for the 15 lessons. At that time we will set up a new campaign for additional financial support to enable filming the next lessons. It is our intent to produce the entire series within three years. The money we collect through pre-orders will greatly help; but they won't be enough. Therefore to finance the entire project we must seek the help of generous patrons, individual or groups. And that we are courageously, even audaciously doing here. We hasten to add that neither ELNA nor the Esperantist working staff receive any monetary profit from the project. Our work is entirely voluntary and unpaid. Our first wish is to provide to the Esperanto movement professional teaching materials.

All **15 lessons of *Pasporto*** can now be viewed for free on YouTube <<https://bit.ly/2OVkInX>>. The accompanying **exercises** <<https://bit.ly/3uiGHWb>> and **texts** <<https://bit.ly/3brqDZg>> are available as free downloads in our online store.
